



2-a Kvaronjaro 1978

N° 67

OFICIALA RAPORTO PRI SETO

Refoje la "Centre Familial du Lazaret" gastigis nin okaze de nia federacia jarkongreso.

SABATON la 22-an de APRILO... La unua laborkunsido okazis de la 16-a ĝis la 18-a. 25 gesamideanoj ĝin partoprenis.

D-ino VIERNE povis definitive plani la prelegvojaĝon, tra nia regiono, de F-ino BORČIĆ EL JUGOSLAVIO, invitita de la grupo de Montpellier.

D-ino VIERNE krome indikis ke, dank'al artikolo anoncanta nian federacian kongreson, ĵurnalisto de "MIDI LIBRE" intervjuis ĝin. Lundon la 24-an de aprilo, tre longa kaj bone dokumentita artikolo aperis en regiona paĝo de "Midi Libre". Bonega propagando !

Ni preparis projekton de rezolucio por la nacia kongreso en Clermont-Ferrand kaj estis decidite ke la aŭtuna laborkunsido, principe, okazos en Narbonne, dum oktobro, eble la 15-an aŭ la 22-an.

S-ro LENTAIGNE anoncis ke en la triaĝa universitato de Montpellier okazas unu-agrada kurso gvidata de S-ro DIEZ kaj ke li mem gvidas duagradan kurson. Tri sinjorinoj de tiu kurso montris sian lingvokapablon kantante en esperanto kaj unu el ili, S-ino Marta d'URBAL, amuzo deklamis du fablojn de Kalosay : "La grilo kaj la formiko" kaj "La vulpo kaj la gruo".

Poste, ano de la grupo de Montpellier, S-ro ENSUQUE deklamis "la vojo"-n de Zamenhof. Je la fino de la laborkunsido ni povis ĝui agrablan promenadon ĉe la marbordo.

Post la vespermanĝo du interesaj filmoj, en esperanto, pri Aŭstralio kaj balo finis tiun unuan kongresan tagon.

DIMANĈON la 23-an de APRILO...

La dua laborkunsido okazis de la 9 h 30 ĝis la 11 h 30. 35 gesamideanoj ĝin partoprenis.

Post onkondukaj vortoj de S-ro LLECH-WALTER nia kasistino, S-ino NEGRON klarigis al ni ke nia financa situacio estas kontentiga.

22 el la ĉeestantoj, membroj de U.F.E. voĉdonis por renovigi la trionon de nia federacia komitato. La kvin antaŭaj membroj rekandidatiĝis : D-ro SALAN, S-ino ROSE, S-ro DELIGNE, S-ino VOLPELIERE, S-ro ENSUQUE k. S-ino NEGRON. 3 voĉdoniloj estis senvalidaj kaj la 5 unuaj nomoj estis reelektitaj laŭ la jena ordo : -la ciferoj indikas la aprobojn - : S-ino NEGRON (19), S-ro ENSUQUE (18), S-ro DELIGNE (17), D-ro SALAN (16), S-ino VOLPELIERE (15), S-ino ROSE (10).

La rezulto de niaj diskutoj destinata al la nacia kongreso de U.F.E. en Clermont-Ferrand troveblas je la fino de tiu ĉi protokolo.

S-ro RAYNAUD invitis la ĉeestantojn partopreni la ekskurson de la Garda Federacio en Beaucaire, la 7-an de majo.

S-ro LENTAIGNE intervenis por rebati du kutimajn kaj falsajn dirojn :

1/.- "Ĉu esperanto estas vere facila lingvo ?"

La kaŭzo pro kio ĝi aspektas malfacila venas ne de la lingvo mem, sed de nia propra nacia lingvo kiu konstante bromsas niam omon esprimi niajn pensojn en esperanto.

2:.- "Ĉu vere estas nur grizharuloj en nia movado ?"

Por kelkaj konkretaj ekzemploj li pruvas ke ne. Ankaŭ ekzistas junaj esperantistoj, Feliĉe !

Li ankaŭ fervore parolas pri la agado de aktiva grupo de esperantistoj en la sino de la pedagogia FREINET-movado kaj montras al la publiko bele prezentitan albumon en esperanto. Ĝi estas de pola infano por infanoj kaj realigita de tiu movado.

La lasta pritraktita punkto estis la urbo de nia venontjara federacia kongreso. Se tio eblos al la lokaj gosamidoanoj, ni tre dezirus ke ĝi okazu en fiksoita urbo de Lozère.

Post la komuna tagmanĝo nia Béziers-a samidoanino, F-ino TERRAL, vere regaligis nin per du tre interesaj filmoj pri Islando kaj Israelo kiujn ŝi mem aranĝis kaj komentis. Sekve F-ino TERRAL kaj S-ino AUTHIER ĉefe rolis en du tre amuzaj skeĉoj kun la bonvola partopreno de S-roj DELIGNE kaj J.C. LANG.

Bonaj laboro kaj distro en simpatia etoso estis la ĝenerala impresoj kiun ni danke ŝuldas al la aranĝintoj kaj partoprenintoj .

JEAN AMOUROUX

ALDONO al la protokolo de la federacia kongreso

La membroj de la federacio kunvenintaj en SETE la 22-an kaj la 23-an de Aprilo 1978 alprenis la jenajn decidojn :

1/.- <u>Voĉdonado</u> :	Rajtis voĉdoni :	38
	Voĉdonis :	27
	Nevalidaj :	0
	Validaj :	27

-- Ĉu vi aprobas la agadraporton de U.F.E. ?

Jes : 26 Sindeteno : 1

-- Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton de U.F.E. ?

Jes : 26 Sindeteno : 1

-- Ĉu vi aprobas la budĝeton de U.F.E. por la jaro 1978 ?

Jes : 26 Sindeteno : 1

2/.- Renovigo de triono de la konsilio de U.F.E. :

	Jes	Sindeteno
BABIN	26	1
CHICOT	25	1
DEBERTONNEE	15	1
GUILLAUME	25	1
LE MAGADURE	26	1
LONGUE EPEE	18	1
NOURMONT	23	1
TRIOLE	26	1
VILHELM	24	1

3/.- Rezolucio :

La kongresintaj membroj de la federacio :

a) gratulas la estraron de U.F.E. kaj aparte la gvidantojn de la varbado-komisiono pro la farita laboro kaj esperas ke pludaŭros kaj etendiĝos tiu agado.

b) aprezas la cirkulerojn de la komisiono sed petas ke personaj nomoj ne estu cititaj sed ke la frukto de atingoj estu lasitaj, ope, nome de esperantistaj rondoj.

c) decidis sendi el nia federacia kaso :

- 200,00 F por la varbadokomisiono

- 100,00 F por la "fonduso materialo"

4/.- Reprezentanto de nia federacio dum la nacia kongreso de U.F.E. en Clermont-Ferrand estos ;

S-ino MOUNIER

17 , Av. de Lattre de Tassigny

30000 N I M E S

Kontrolis la voĉdonadojn :

S-roj VOLPELIERE , ENSUQUE , AMOUROUX .

Historio de Katalunio

Por bone komprenigi la socian fenomenon, ke same en la nordorienta parto de Hispanujo kiel ankaŭ en la franca departemento de la Orientaj Pireneoj, oni konservas la saman popolan lingvon kaj la samajn folklorajn tradiciojn, t.e., mi devas, antaŭ ol paroli pri la katalunaj dancoj, diri kelkajn vortojn pri la kataluna historio.

Ambaŭ regionoj, pri kiuj mi ĵus parolis, formis iam politikan tuton, t.e. la Kataluna Regno, kies influo kaj rolo en la mezepoko estis tre vasta.

Post la forpelo el tiu teritorio de la maŭraj invadintoj, la kataluna regiono estis dividita en pluraj graflandoj. Iom post iom la politika povo super ĉiuj katalunaj graflanoj centriĝis en la barcelonaj grafoj, kiuj finfine plifirmigis tiun povon akirinte la kvalifikon de reĝoj. Ni trovas jam en la 12^o jarcento Katalunio kiel sendependa reĝlando. Tiu-ĉi fariĝas poste pli ampleksa; Aragono, granda regiono de la Iberia Duoninsulo formas konfederacion kun Katalunio. Tiam komenciĝas prospera epoko por tiu regno, kiu ampleksis iam vastajn regionojn de pluraj mediteraneaj landoj.

Sed tiu prospero ne devis esti tre daŭra. La unua skismo jam aperis post kiam la reĝo Jakobo la 1^a disdividis sian regnon en pluraj ŝtatoj kiujn li transdonis herede el siaj filoj. Unu el tiuj estis la regno de Majorko, kies ĉefurbo troviĝis ne en la Balearaj Insuloj, sed en Rusiljono, t.e. en Perpignan.

La kataluna unueco retroviĝis pli poste, sed la cirkonstanco ke la reĝo de Aragono-Katalunio Fernando la Katolika edziĝis kun la reĝino de Kastilio Isabela, estis la komenca punkto de la estonta dekadenco de Katalunio kiel memstara regno. La kastila influo komencis kreskadi senĉese.

Aliflanke, la francaj reĝoj daŭre tendencis aneksi al la Franca Regno la rusiljonan regionon. Jam en la 15^a Jarcento la franca reĝo Ludoviko la 11^a (dekunua) konkeris la urbon Perpignan kaj la regionon, kiun li forlasis post 13 jaroj de okupado. Pluraj invadoj okazis ekde tiu momento, kiuj forte malprosperigis la ĝis tiam riĉan regionon. Finfine, en la 1659, en la insuleto de la Fazanoj, meze de rivero Bidasoa, inter Irun kaj Hendaye, la reprezentantoj de la franca reĝo Ludoviko la 14^a kaj de la hispana Filipo la 4^a subskribis la famon traktaton de la Pireneoj, kiu definitive fiksas la landlimon inter ambaŭ ŝtatoj, kaj kiu starigis pacon inter la du regnoj post miljara militado.

Por ni, esperantistoj, kiuj kutime havas supernacian rigardon, aperas ke, se la traktato estis dezirinda pro la fakto ke ĝi donis pacon al la du militantaj partioj tamen ĝi kaŭzis artefaritan dividon de du popoloj, la baska kaj la kataluna, popoloj kiuj verdire havis absolute nenion komunan, nek kun Hispanujo, nek kun Francujo, ĉar iliaj lingvoj, kutimoj, leĝoj, tradicioj kaj folkloro nete kaj abrupte diferenciĝis de tiuj de la apudaj regnoj.

Sed la eŭropa historio, bedaŭrinde, abundas je tiaj arbitraj perfortaj dividoj, en kiuj la loĝantaro neniam estis konsultita pri ĝiaj deziroj, ĉu resti aŭtonoma, ĉu aparteni al unu aŭ al la alia partio. Tio okazas eĉ en nia progresema 20^a jarcento, do, la artefarita divido de la baska kaj kataluna landoj antaŭ 300 jaroj aperas hodiaŭ kiel fenomeno jam tro malnova.

La faktoj kiujn mi deziras reliefigi estas la kulturaj sekvoj de la ĵus ditaj okazintaĵoj.

La kataluna lingvo estis brile florinta dum la Mezepoko. Ĝi estis ĝenerale uzita de la mediteraneaj komercistoj, ĝis tia grado, ke eĉ hodiaŭ restas en multaj mediteraneaj lingvoj pluraj esprimoj de kataluna deveno.

Gravaj verkistoj uzis ĝin, inter aliaj la famkonata filozofo Ramon LULL kaj la reĝo JAKOBO la 1^a mem. Ankaŭ estas menciinda tiama populara novelisto Johanot MARETORELL, verkinto de libro kiu inspiris la faman Cervantès por la verkado de "Don Kihoto".

Tamen, la kataluna lingvo multe dekadencis post la unuiĝo kun Kastilio en la 15^a Jarcento. La influo de la kastila etendiĝis eĉ al Rusiljono, kie ankoraŭ en la popola lingvo nuntempe oni trovas iafeje kastilajn vortojn.

Post la divido de la Katalunio, en la norda flanko de la Pireneoj, la franca influo sur la kataluna lingvo baldaŭ rimarkiĝis.

Kiel ni vidos pli poste, la lingva dekadenco en la hispana parto de Katalunio daŭris proksimume ĝis la mezo de la 19^a jarcento. Tiam aperis aro da verkistoj kiuj komencis la malfacilan taskon renaskigi tiun lingvon. Malgraŭ fortaj malfacilaĵoj ili sukcesis, ĉar nuntempe en la hispana Katalunio oni grandnombre eldonas librojn en tiu lingvo kaj ĝi estas amplekse uzata en la regiono fare de ĉiuj tavoloj de la socio.

La renaskiĝo de la kataluna lingvo estis ĝis nun malpli vigla en Rusiljono, sed ĝuste antaŭnelonge oni fondis la Rusiljonan Grupon de Katalunaj Studoj, kiun mi mem prezidas, inter kies celoj troviĝas la disvastigo de la katalunlingva kulturo.

Anekdote mi povas aldoni, por fini mian mallongan klarigon pri la lingva flanko, ke la kataluna lingvo estas la oficiala ŝtatlingvo de la malgranda lando Andoro, kie, kurioze, la enloĝantoj nomas ĝin "andora" lingvo, kiel ĉiu el vi povas konstati se vi legas en la francaj radio-revuoĵ la programo de la "Radiostacio de la Valoj".

Koncerne la popoldancojn, la kataluna dekadenco de la 17^a jarcento forte influis por ĝia malapero, kiel ni vidas en la historio de la sardano. Nur tiuj dancoj restis en la montara pirenea regiono mem.

Sed feliĉe, renaskiga movado de la kataluna kulturo ankaŭ sukcesis revivigi almenaŭ la plej belan el ĉiuj katalunaj popoldancoj : la sardanon.

En 1833 Bonaventura Carles ARIBAU faris en Barcelono faman alvokon por ke la malnova lingvo de la praavoj eliru en la tombo kaj laŭtiĝu tra la mondo. En 1840, Pep VENTURA reformas en Perpignan la katalunajn orkestrojn kaj komponas serion da belegaj sardanoj. Tiuj estas, do, la veraj patroj de la mirinda renaskiĝo de la katalunaj folkloro kaj lingvo. Kaj estas rimarkinde ke la du katalunaj ĉefurboj, tiu de la franca parto kaj tiu de la hispana estis la scenejoj de tiel memorindaj faktoj.

120 jarojn poste la sardano ne nur konkeris la tutan Katalunio, ambaŭ flanko de la Pireneoj, sed eĉ ĝi estas dancata de la katalunoj loĝantaj en Parizo aŭ Madrido kaj eĉ en aliaj grandurboj de la mondo.

René LLECH-WALTER (Prelego ĉe Kastelo Grésillon, la 10-an de aprilo 1978)



VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

MONTPELLIER :

La akcepto de F-ino Lucija BORČIĆ el Zagreb glate okazis. Ŝi povis viziti la 3 kursojn kaj paroligi la lernantojn.

La lasta kunveno de la jaro estas jam tradicie kampara kunveno. Ges-roj LEENHARDT akceptas nin en Fonfrège (Rte de Ganges - post la pilonoj de la radio) la 1^{an} de julio de la 17^a ĝis la 22^a horo. Kiel kutime fajro ebligas rosti kiom vi kunportos.

Esperanto Semajno ĉe maro.

La sekcio Esperanto de la Université du Tiers Temps organizas en LAZARET en SETE (kie ni kongresis) stud-semajnon.

Dato de la dimanĉo la 10^a de septembro post tagmanĝo ĝis la dimanĉo 17^a posttagmeze. Prezo : Loĝado en 2 litocambro : 350 F. (Suplemento de 70 F por 1 litocambro). - 3 manĝoj

- Kursoj


Kunporti siajn tualettukojn (ne la littukojn...)

Programo : Kursoj - Ekskursoj - Kulturaj Vesperoj - Bano...

Aliĝo : la plej rapide eble al S-ro Armand DIEZ, Villa Colombe

514 Rue de l'Aiguelongue
34100 MONTPELLIER

(Y.V.)



EN LA ALIAJ FEDERACIOJ : NOYELLES - CODAULT - Norda Francujo : Disdono de vortaroj.

La magistrata estraro decidis donaci al la regulaj ĉeestantoj de la loka E-kurso

Vendrede 24-an de Marto, en salono de la Kultura kaj Sporta Centro, la urbestro, S-ro Gérard THERY disdonis vortarojn al la 10 junaj gelernantoj. La kursgvidanto, S-ro Lucien BOURGOIS estas magistratano. Ankaŭ ĉeestis vicurbestro, S-ro Edouard BAHR. Tiu ceremonio ankaŭ arigis kelkajn parencojn de la rekompencatoj kaj esperantistojn el la ĉirkaŭaĵo, i.a. Renée TRIOLLE, Ĝenerala Sekretario de U.F.E., I. FLACZYNSKI, kiu aranĝas ekspozicion pri la E-libro en nia regiono, Michel BOUCHEZ, E-profesoro en apuda urbo Fouquières lès Lens, kaj S-ino HARTRIDGE, el LONDON, kies edzo estas ankaŭ E-instruanto.

Historie Vera



Ĉirkaŭ j. 1600

La bona reĝo Henriko la Kvara (Dio havu lian animon!) kiam li ne estis retenita en Parizo pro la devoj de sia ofico (kial li ne pli sin gardis kontraŭ la perfidaj vetur-embarasoj de la urbego? - sed tio estas alia historio!) - do, la bona reĝo Henriko, kiam li ne estis en Parizo, travizitadis sian reĝolandon. Li vojaĝis kun aparta plezuro, piede, rajde aŭ veture, en Okcitanio, kaj li amis interparoli kun tieaj landanoj en lialingvo.

Iun tagon li alvenis en la vilaĝo Saint-Privat-des-Vieux apud Aleso. Antaŭ blanka dometo, en la sunlumo, sidis blankbarbulo kun klinita kapo, la rando de la nigra ĉapelo sur la okuloj, la mentono sur ambaŭ manoj apogitaj sur bastono, kaj singulte ploranta.

La reĝo alproksimiĝis kaj alparolis lin.

- Nu, bravulo, kial vi tiel ploras?
- Hi! Hi! mia patro batis min...
- Via patro, ĉu? ...
- Jes, sinjoro.
- Kie li estas, tiu severa patro?
- Tie interne, trikanta ŝtrumpojn!

La reĝo, puŝinte la pordon, sin trovas antaŭ alta fortikulo, rekta kiel cipreso, seka kiel olivarbo sur la garigo, kun akraj, malgrandaj okuloj sub hirtaj brovoj, kaj ne tre afabla mieno.

La reĝo, en bearna dialekto: - Adiŝat †^{XX}

- Adiŝias! †^{XX} respondas la dommastro. Per kio mi povas komplezi al vi? (la vortoj estis gentilaj, sed la tono estis iomete abrupta)

La reĝo rekte atakas:

- Diru al mi: kial vi batis vian filon?
- Mian knabon? Tiun malician friponeton? ... Ĉu li ne malrespekte parolis al sia avo?

La Bearnano ne estis facile surprizebla. Tamen, ĉe tiuj vortoj, li ne povis kaŝi sian miron.

- Al sia avo? Ĉu mi bone aŭdis? Ĉu vi parolas pri via propra patro?
- Ho! pri kiu do? Jes ja, kompreneble, mia patro.
- Sed kie estas tiu respektinda persono?
- Tie supre (montrante la plafonon). Manganta kaŝtanojn, kredeble.

La reĝo, sen plua parolo, rapide surgrimpas krutan ŝtupetaron, levas klap-tabulon kaj eniras en la subtegmenton. Tie, efektive, sidis ĉe tablo afabl-aspekta patriarko kun haroj kaj barbo ankoraŭ pli longaj ol la du aliaj, kiu ridetis al li.

- Saluton, Matusalemo †^{XXX}! diris la reĝo. Kiel vi fartas?
- Kiel la maljunuloj... Estu bonvena... Sidiĝu. Vi ja mangos kun mi kelkajn kaŝtanojn... Kaj jen: vi gustumos tiun blankan vineton de Sankta Johano de l'Pino - vi diros vian opinion pri ĝi.
- Volonte... Dankon.

La reĝo sencremonie sidiĝas kaj komencas mangi sed urĝa demando tiklis lian langon:

- Diru al mi, bonulo: kiomaĝa vi estas?
- Kion vi diras? (metante manon malantaŭ sian oreilon - ja, li tamen estis iomete surda)

La reĝo, plilaŭtigante la voĉon:

- Mi demandas: kiomaĝa vi estas?
- Ho! ne krii tiel laŭte. Mi ja ne estas surda! Kiomaĝa? Nu... (kalkulante sur siaj fingroj)... Jen: mi estas 195 jara... Kaj se vi ne volas tio kredi, iru demandi la parokestron de Sankta-Privato, kiu min baptis...

Nun vi scias, kial tiu vilaĝo estas nomita Sankta-Privato-de-la-Maljunuloj!!!

V A L O

Notoj: X seka grundo kun arbedoj kaj arbustoj, pli seka ol makiso

XX Al Dio estu (en favoro): okcitana saluto

XXX Metuŝelaĥ (PIV)

SOMERAJ STULTAĴOJ



Iufoje, Lia Reĝa Moŝto LEONO vagis tra sabloplena dezerto, serĉante ion por manĝi, eĉ sekajn akridojn... Subite, Li haltis antaŭ malalta verdema kreskaĵo kiel Li neniam estis vidinta.

Li eltiris ĝin zorge kaj ekvidis blankamradikon, sufiĉe longa kaj ventroforma. Aparta odoro trafis liajn flartruojn.

- "Ŝuet' " li gruntetis, mi oferis tiun boteleton de tielmalofta parfumo al mia karega kunulino ! kaj li forportis sian eltrovon ĝis roka kuŝejo.

Sed li deziris koni la nomon de tiu kreskaĵo kaj li venigis sian Ministron pri Kulturaj Aferoj kiu estis tre maljuna ŝakalo, tute ne manĝebla.

- Ekkriis la respekta scienculo !
Via Reĝa Moŝto estas feliĉega homo, ĉar tio valoras kiel trezoro ! Tio estas la nura napo kiun oni povas eltrovi en tuta Afriko, kaj ĝin oni devas admiri pli ol diamanto !

La reĝo decidis sin ordenis per tiu raraĵo kaj la kreskaĵo estis alkrocata en lia luksa flava kolhararo, sub lia faŭko. Kaj, post la flatema ministro, ĉiuj korteguloj laŭte trifoje kriegis :

- Vivu NAPO-LEONO !

H. J.

TIU KARA MALNOVA LINGVO !!!

Samideano donacis al mi sufiĉan malnovan vortareton, presitan en 1906 kaj kies aŭtoroj estis Th. Cart, M. Marckens k. P. Berthelot. La eldonejo estis Hachette, kiu, en tiu epoko, presis multe por Esperanto en speciala kolekto kie oni povas eltrovi :

- Tutmonda Jarlibro Esperantista (1905) enhavanta la adresarojn de Zamenhof, nome pli da 20.000 adresoj ;
- Internacia Scienca Revuo (aperanta de la 1-a de januaro 1904), kies la estrakomitato enhavis : Société française de Physique, Société Internationale des Electriciens, MM. Adelsköld, Appell, d'Arsonval, Baudoin de Courtenay, Becquerel, Berthelot, Bouchard, Brouardel, Deslandres, Generalo Sèbert...
Inter diversaj titoloj, mi ekstratas : Pri la Teorio de l'Jonoj (Dr Helte), Provo de Kemia Kompreno de l'Monda Etero (Mendelejev). La fama scienculo, Einstein estis notita kiel kunlaboranto.

Kaj nun, tiom da kleruloj silentadas aŭ malakceptas la ideon de neŭtrala internacia lingvo ! Kie sin trovas samideanoj kiel Aisberg kiu vulgarigis Tosofon dank'al konata verko skribita rekte esperantlingve el kiu ĉiu lando havis sian tradukon !

H. J.

RIBELO EN VARSOVIA GETTO !

La 18-an de januaro 1943, kolono de germanaj militistoj estis "akceptita" per ĵetado de grenadoj kiuj mortigis tridekon da mortoj. Tiu fakto okazis sur la strato Zamenhofska, kaj ĝi estas prezentata kiel la eko de la subpremado de la varsovia getto.

(Laŭ "Télé-7 - Jours")

SUPERA ESPERANTISTA LERNEJO en LA CHAUX de FONDS (Svisio) :

Raportante la Federacian Kongreson "Bourgogne - Franche-Comté" en Besançon en kiu ĉeestis S-ano Claude GACOND (Députato de Neufchâtel), la gazeto " République de l'Est" anoncas tiun baldaŭan realigadon kiu disponus 7 konstruadojn por akcepti profesoroj kaj studentojn....

H. J.

Tiun paĝon aperas lastmomente dum foresto de Dro SALAN, ĉi tiu do ne responsas pri ĝi

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 2^{me} Trimestre 1978

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes